

La lasta numero de La Nica Literatura Revuo.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 decembro 26.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-159/Radiokasedo-159-B-994-1985-dec-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-lasta-numero-de-La-Nica-Literatura-Revuo.mp3>

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ekde la fino de la monato oktobro ni turnis vian atenton al la vive efemera sed enhave daŭre aktuala Nica Literatura Revuo, kies apero komenciĝis antaŭ tridek jaroj, tio estas en 1955. La lasta numero, la 42-a, eldoniĝis sep jarojn poste markante la finon de eksterordinara eksperimento.

A.- Tiu ĉi lasta numero komenciĝis kun citaĵo el la Biblio, pli precize el la libro Eliro:

Cl.- "Se vi aĉetos sklavon, li servu dum ses jaroj; sed en la sepa li eliru libera"

A.- Kiel lasta ero en tiu ĉi lasta numero de La Nica Literatura Revuo la ĉefredaktoro Gaston Waringhien, sub la plumnomo G. E. MAURA kantis tiel la liberiĝon el la nica galero:

Cl.- Liberecon ! Al miaj kolegoj de sufero sur la Nica galero.
Sep jarojn ni sur tiu sklavoŝip'
remadis - sed finiĝas nun la krozo.

A.- Sekvas verso iom mistera por nelertaj esperantistoj, ĉar de la interjekcio *uf !*, esprimanta faciliĝon post laceco, penado kaj similaĵoj, Gaston Waringhien faras la adverbbon *ufe da*, esprimanta la liberiĝon el surŝipaj manĝaĵoj, kiuj estas la sekigita, nesalumita moruo, kiun la fiŝistoj nomas *gado*. Tiujn fiŝojn oni peklas, tio estas, oni metas en salon, salpetron aŭ salakvon por konservi ilin manĝeblajn. Ili estas do peklaĵo. Haringojn oni ofte konservadas tiel, kaj specio da haringoj havas la nomon *alozo*. Jen do la du sekvaj versoj, kiuj esprimas la liberiĝon el tiu surŝipa manĝaĵo;

Cl.- Ufe da gad', peklaĵo kaj alozo -
ek al biftekoj, fratoj, ek al trip'!

A.- Sekvas versoj kompreneblaj sen klarigoj, escepte por la lasta vorto *karagjoz*, kiu estas glosita tiel:

Cl.- Grandpenisa, rabeza heroo en la turka marionet-ludo.

A.- Aŭdu la tutan poemon, kiu kantas la liberiĝon el la ĉefredaktoreco por la Nica Literatura Revuo :

Cl.- Sep jarojn ni sur tiu sklavoŝip'
remadis - sed finiĝas nun la krozo.
Ufe da gad', peklaĵo kaj alozo -
ek al biftekoj, fratoj, ek al trip' !

Tro longe jam kurbigis nin sub vip'
Ĉefredaktor' ĝis cerba ankilozo.
Al ni la ĝuoj de poem' aŭ prozo
senzorge pri 1' diable falsa tip' !

Paper' kaj ink' - jen nutro de neŭroz':
nin naŭzas la kompleksoj kaj Edipo.
La viv', senlaca je metamorfoz'.

al viaj fingroj kaj al via lipo
gardas ankoraŭ pli ol unu roz'
kaj pli ol unu sem' por la disipo -

kaj fajfu pri cetero, karagjoz!

A.- Tiuj poemoj tutcerte multon alportis lingve al la legantoj de La Nica Literatura Revuo. Tiu ĉi, kiun vi ĵus aŭdis demonstros, ke eĉ la interjekcio *uf* povas formi adverbos, instruas al la legantoj fiŝ- kaj manĝ-nomojn kaj alportas per siaj rimoj ip kaj ozo aŭ oz kaj ipo senton pri malfacila vivo. Sed kiuj estis tiuj sklavoj, kiujn la ĉefredaktoro Gaston Waringhien kurbigis sub vipo ĝis cerba ankilo. Tiu lasta numero de La Nica Literatura Revuo kvazaŭ antologias ilin. Unue ni trovas antaŭparolajn vortojn de la ĉefredaktoro:

Cl.- "Sep plenaj jaroj pasis de la tempo, kiam aperis la unua numero de tiu ĉi revuo: bela servodaŭro, kaj pli longa eĉ, ol postulite. Ne miru do, se ni sentis la bezonon demeti la jugon de sur niaj ŝultroj kaj forvaporigi el via vido. Jen do venis, kiel diris Hugo, la "Hor' trista, kiam, ĉiu al sia flank' disiras!" sed, en nia okazo, mi esperas, estos nenia kaŭzo por malĝojiĝo. Dum sep jaroj ni, la aŭtoroj, vi, la legantoj, kune ĝojis, malkovrante novajn belojn, novajn horizontojn en nia beletra lando."

A.- Sekvas esperantigo el la greka de Kolomano Kalocsay. Aŭdu kelkajn versojn el "La festo de Adonis" de Teokritos:

Cl.- "Ĉu vi ĉesos, malfeliĉaj, sen paŭzeto babili kiel turdoj? Ĉiujn ja konsumas via larĝabuŝa parolo! Ma, de kie do ĉi homo? Kio al li, eĉ se ni klaĉas?

A.- Ni ŝatus povi legi al vi la novelon "La ĝojaj ĝemeloj" de Raymond Schwartz, sed eĉ por tuta elsendo ĝi estus tro longa.

Cl.- De Roger Bernard ni ricevas esperantigon de poemo de Jules Supervielle, kiun li dediĉas al Marjorie Boulton, kaj sekvas originalaĵo de Georgo Lagrange, kies tri lastajn versojn mi citas:

*inter la homoj fremda sin senti ĝis la vomo,
iri sen lambastonoj de 1' mitoj kaj de 1' dioj,
kaj homa resti tamen, kaj fidi je la homo...*

A.- De Marjorie Boulton ni ricevas studon pri la brita romanverkistino Iris Murdoch; de Tomaŝ Pumpr esperantigon el la litova lingvo, de William Auld eseon koncerne la forgesitan ĉefverkon Metropoliteno de Varankin, de Lajos Tárkony poemetojn pri muziko kaj muzikistoj.

Cl.- Sekvas recenzoj de Henri Vatré pri la Proverbaro Esperanta kaj de Roger Bernard pri la libro Planlingvaj problemoj de William Gilbert.

A.- Kaj dank' al eseo de Gaston Waringhien ni intimiĝas kun la poeziarto de Emilio Verhaeren.

Cl.- Tiel konkludiĝis tre signifa beletra periodo en la esperanto literaturo. Post la dua mondmilito, kiam sentiĝis la manko de kunigilo, ĉar "Literatura Mondo" ne povis reludi sian realan rolon sub la stalina regado, troviĝis en Nico la mecenato Fiquet, kiu invitis Gastonon Waringhien redakti esperanto-revuon. Ni ricevis ĉefverkon, kiu indus je reeldono, ĉar malmultas la kompletaj kolektoj en la esperanto-bibliotekoj.

A.- Ĝian realan signifon oni malkovris, kiam ĝi ĉesis aperi. La anoncita revuo Kulturo redaktota de William Auld mortnaskiĝis. La Norda Prismo restis regiona revuo. Kontraŭe La Nica Literatura Revuo tuj fariĝis universala enhave kaj spirite. Tion ni ŝuldas al la personeco mem de la elektita ĉefredaktoro, do al la elektokapablo de la mecenato, kiu ĉiam lasis plenan ag-liberecon, kion ne ebligis plu la posteuloj de Literatura Mondo en Budapeŝto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Ekde la venonta semajno ni salutos la aŭskultantojn, kiuj skribis al ni dum tiu ĉi jaro, kiu finiĝu agrable por vi ĉiuj. La jaro nova estu fruktodona por ni ĉiuj, esperantistoj. Ĝi antaŭanoncu dignan jubilean jaron.

A.- Claude kaj Andrée Gacond diras al ĉiuj: Bonan novan jaron!
Kaj : Ĝis reaŭdo!